




Julio - 1996 - N° 16-a


ASTURIO

ENHAVO:

- 2.... Nia Urbo
- 3.... Xanas
- 4.... Kiel sunhorloĝo
- 5.... Plenluno
- 6-7.. La francoj foriras kaj
la germanoj avancas
- 8..... Astura poezio
- 9..... Mesaĝoj
- 10... Tiel la mondo iras
- 11... La kato de Matignon
- 12... Frazoj - Aforismoj
- 13... Tiddalik - La inundigulo
- 14.... Kuriozaĵoj
- 15... Amuzaĵoj
- 16... Astura Kanto



**REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO**



NIA URBO

Komunikiloj

Estraro de ANTAŬEN

Prezidanto: Nicolás Muñiz

Sekretariino: M^{re} Luisa Menéndez

Kasisto: Celestino Fernández

Bibliotekisto: César García

Desegnisto: Císimo Rabanedo

Gekomitatanoj:

M^{re} José Alvarez Faedo

Luis González

David Menéndez

Eva González

Nia adreso:

Casa Municipal de Cultura
33400 AVILES (Asturias)
Tfn°.- 98-554 11 27
Subvenciita per la Registraro de la
Avilesa Municipo.

Depósito legal n° As. 1398 (9)

Ampleksa vojreto de interurbaj busoj kunigas la centra parto de Avilés - preskaŭ ĉiuj kun eliroj ekde la Parko de la Kajo - kun ĝiaj periferaj kvartaloj kaj vilaĝoj de la samlimaj municipoj. La kvartaloj de Villalegre, Versailles kaj Valliniello kaj la ĉefurboj de la proksimaj municipoj, Luanco, Piedras Blancas, Illas kaj Grado kuniĝas al Avilés per landvojoj de akceptebla stato.

La N-632 trapasas Avilés voje al Galicia aŭ Cantabria. La ŭrbo estas komenco de unu el la interspacoj de la autovojo konata kiel la "Astura Y" kuniĝante ĝin al Gijon kaj Oviedo sen paspago.

Per ĝia situacio en la centra parto de la regiono Avilés estas malpli ol du horoj je distanco en automovilo el la plej konataj turismaj lokoj, el la stacioj de skio de San Isidro aŭ Pajares, kaj de la limoj de la regiono kun Galicia, Cantabria aŭ León.

La Redakcio (Daŭrigos)



"XANAS"

Tiu ĉi estas, sendube, la plej pura mito riprezentante de Asturio.

La "xanas", estas bonfaraj feinoj de dolĉa akvo, kiuj posedas tutan humanan morfologion. De malgranda staturo, eksterordinara beleco kaj blonda longhararo, ili vestiĝas ordinaro lokan tipan kostumon kaj ili estas kristanaj. Ili loĝas ĉe la fontoj, ĉe la kavernoj kaj eĉ ĉe riverbordoj. Kelkaj "xanas" estas ensorĉitaj kaj ili posedas grandajn trezorojn. Antaŭ iliaj hejmoj ili disverŝas, laŭokaze, ŝpinbastonojn kaj fadenbulojn el oro aŭ argento. Unu el iliaj ĉefaj aktivecoj estas ŝpini, kaj el la samaj ĉarmaj metaloj estas la kombiloj, tondiloj, kokoj kaj kokinoj, kegloj kaj buloj kun kiuj ili ludas en la sorĉa mateno de Sankta Johano. La "xanas", nur estas videblaj, ĝenerale, al la ektagiĝo kaj ili ne ĉiam rezultas fuĝitaj ĉar de tempo al tempo ili subtenas amikajn interrilatojn kun la paŝtistoj kaj kamparanoj, al kiuj ili donacas aĵojn el oro aŭ argento en dankemo pro iu ajn pruntedona favoro.

Ludoviko.

KIEL SUNHORLOĜO

Por Maria...
Ĉu por kiu se ne?.



Homologa homo,
ekzakta homo,
ne ekzistas la Tempo,
vi estas la ekzekutisto.

Kiel sunhorloĝo, ŝi neniam oni haltos. De la lumo al la ombro kaj de la nokto al la tago ŝi marŝas sen ripozo, sen tempo por fariĝi pli demandojn.

La eĥo el ŝiaj paŝoj alportigas al ŝi de tempo al tempo pecojn el estinteco: iun sonĝon perdita en aliaj brakoj, iun adiaŭon. Neniam estas malfrue, la vivo ne urĝiu min, oni diris; sed de longa tempo ŝi timas ŝian memoron kaj fuĝas de tiuj voĉoj rapidigante la paŝo.

Kuras, malĝoja montrilo, fugante de se mem -"Mia estos la estonteco, la saveco... la feliĉeco!"- sen scii ke ŝi estas mallibera de la turo pli alta kaj en koncentraj cirkloj oni eskapas ŝian estontecon sen eblo de avanco.

Ĉiam en la memformo la vespero surprizigas ŝin : duonkudrante mensogojn tute sole kun ŝia haŭto. Tiu ĉi neniam pardonas. Ŝi transdonis ŝian haŭton al la morto antaŭ velki ĝin, sen apenaŭ sensi ĝin, sen apenaŭ ĝui ĝin.

Ununura demando malebligas ŝian detruon. Eldirita antaŭ multe da jarcentoj, de neeble respondo, navigas ŝiajn silentojn, ŝipperea trunko, kapabla por disigi unu maron en du.

Kiel sunhorloĝo, neniam oni haltos. Kaj dum aliaj vivoj flamas sole avidante ŝiajn akvojn, ŝi daŭrigas teksante la dezertan vefton el ŝiaj tagoj, pentsakaĵo el ŝiaj noktoj, ĉiam senhaltiĝi pro timi la dubon..

DAMEGO

PLENLUNO

**Mi estis por vi kiel lumo de l' ĉielo,
eterna kaj ĉiam nova plenluno de amo;
al vi mi donis versojn plenajn de subtila espero
kie ĉia parolo estis karno el floro.**



**Mi estas bona. Vi ĝin scias
kvankam vi silentas senornaman veston...
pro tio mia amo estas malriĉa, sed kiel la birdoj
mi estras la mondon nur malfermante la flugilojn!...**

*Verkis : Luis Menéndez Lumen
Esperantigis: M^a Luisa Menéndez*

LA FRANCOJ FORIRAS, KAJ LA GERMANOJ AVANCAS

La sekvanta rakontado estas historia:

Iam, je la jaro 181..., kiam mia praavo - kiu nomiĝis Markos, edzigita kun mia praavino, kiu nomiĝis Dorotea kaj kiuj loĝis en la urbo de N, kun filineto al kiu mi ne nomas pro kaŭzoj. Kiujn mi diskretas - faris la fiagon kiu estas la temo de tiu-ĉi fabelo, kiu estis tre festata tiam; kaj eĉ pasis de genero al genero ĝis la mia.

La armeo de Napoleono estis malaperante el Hispanio iom post iom. Markos estis parto el gerilo da samlandanoj kies kazerno estis kabaneto - duono: restoraciaĉo; duono: magazeno da malnovaj meblaĉoj, situata en strateto nomata "de la Diablo".

Okazis ke, ofte, tiuj-ĉi geriluloj eliris serĉante la invadantojn; sed nia heroo - kiu ne estis same kiel tiuj Emancipadoj, nek kiel tiuj Espoz y Mina, nek kiel tiom da grandaj homoj kiuj brilis tiu-tempe -, apenaŭ troviĝis ekster la vilaĝo, li firmstariĝis, li turniĝis dekstren, li rigardis malantaŭen kaj, transdonante sian malnovan fusilon de sparko al la plej proksima samideano, kun voĉo iomete trema, li diris: "Frato, mi reiras al la ĉefkvartiro!" - kaj kun firma paso li direktiĝis al historia restoraciaĉo por sensoifiĝi drinkante malan vinon kaj pli malan cidron ĝis li perdis la malmultan scion kiun Dio donis al li. Sed tiu ne estas la fakto kiun mi volas rakonti al vi.

Lia edzino, kiu estis panistino, gardis en kofrego la Napoleonojn, kiuj estis moneroj de deknaŭ reĝaj realoj. La nazo de Markos flaris la gardatan monon kaj li pensis la manieron por fari ĝin malaperi. Ĉiu-tage, kun perfida ŝlosilo, forprenis el la

Kofrego du aŭ tri Napoleonojn kaj, post ŝanĝi ilin en la unua
taverno kiun li trovis, li reiris hejme ebriema. Apenaŭ li trapasis
la sojlon, li ekkriis militeme: "Dorotea, la francoj foriras!" - La
bona virino, ne komprenante la duoblan signifon de tiu-ĉi vorto,
diris: "Lasu ke ili iros, kaj ke la demonoj kunportos ilin."

Tiu-ĉi sceno ripetigis ĉiu-tage dum unu monato. Sed, danke al
la neceso kiun la edzino havis por uzi la monon por pagi la
renton de la domo, ŝi eltrovis ke ne restis en la kofrego ke ses
Napoleonoj kaj ĝi ne okazis denove.

"Ha, kanajlo! Ebriemulo! Senhontulo!" - ekkriis, senkonsole,
la povra virino, tirante el siaj haroj kiam ŝi vidis la malaperon de
la moneroj. "Tial li diris ke la francoj foriris. Ebriemulo! Li iam
pentoferos!"

Unu horo poste, Markos alvenis hejme kun lia kutima
ebrieco; li rigardis lian edzinon kun stultaj okuloj kaj li diris,
afliktata, la eternan frazon: "Dorotea, ha! Jam preskaŭ ĉiuj la
francoj foriris!"

"Do, la francoj, ĉu ne?" - ŝi ekkriis furioze. La matrino kaj la
filino - kiu subite aperis - batis lin kun iliaj manoj kaj piedoj, ili
mordis kaj gratvundis lin ĝis ili estis lacigitaj, kaj tiam, post la
batado, alvenis la insultoj: "Mala viro! Fripono! Mallaborema!
Kial faris vi tion? Kial? Respondu."

La batita Markos, surgenuigante, kun siaj brakoj en formo
de kruco kaj sangadante sur la planko, gemis: "Kial? ĉar mi
malamis ĉiujn la Napoleonojn. Tial mi foririgis ilin!"

MINGOLÍN

VERKIS: GASPARD MUÑIZ ARIAS

ESPERANTIGIS: MARÍA JOSÉ ALVAREZ FAEDO

LA MARO

**Elhejmigita el la korpo
kiu donis al mi varmon,
marŝanta vagabondo
sen iu kiun brakumi,
deserto forgesita de l' fairo
kiu nutras**

**Soleca viro trairas la mondon
malgaja ombro kiu krias
al la ceteruloj
de neniu respondita
(Ili min ne notas kiam mi vokas,
ili min ne aŭskultas)**

**Nur la maro kantas la lulkanton
en la nokto de la glacio,
nur la maro kiu mi invitas
nur la maro kiu min kuniras.**

MESAGĜOJ

Ni sendas nian modestan revuon al ĉiuj niaj letergeamikoj kaj diversaj Asocioj. Ni plezuriĝis ĉar, ni konstatis, ĝi estas tre bone akceptita kaj laŭdita

* * *

Ni multe surpriziĝis, kiam ni vidis, en la kovrilo de hispana bulteno (aprilo majo) nian fratan foton, farita dum la lasta Zamenhoftago, celebrita en Avilés. Ankaŭ ni aperis en gazeto "Heroldo".

* * *

Ni ricevis norvegan revuon, tre interesa, sendita de nia bona korrespondantino Ellen Dalen. Ni legos ĝin, plezure.

Ankaŭ ni ricevis la revuon "El Correo del Esperanto", eldonita per la Hispana Federacio de Esperanto. Nia grupo konsideris ĝin tre interesa kaj promesas kunlabori pere de nia agmaniero.

* * *

Niaj kursoj ĉijare, jam finis en la pasinta monato majo. Gvidantoj kaj gelernantoj pasigis tagojn tre feliĉajn ĉar ĉiuj sentas grandan emon favore al la disvolvado de E-o. Kelkaj gelernantoj jam korespondas kun gesamideanoj de la t. m. eĉ unu el ili - Luis González- partoprenis kun lia interesa laboro pri la asturaj "Xanas", en la nuntempa eldonaĵo de nia revuo.

Korespondi deziras:

María Daise Murillo Zaballa kun geesperantistoj t.m.

*Adreso: c/ Sabino Alvarez Gendin 9-B.5°-A
33400-AVILES (Asturias) España.*



María Inés Casal Lorenzo. (Pri ĉiuj temoj)

*Adreso: c/ San Juan de Dios 22-3°-A El Pozón.
33400 AVILES (Asturias) España.*

TIEL LA MONDO IRAS

Tiel la mondo iras,
tiel la mondo iras,
tiel la mondo iras
tiel la mond'.
Lundo, merkredo, sabato,
mardo, jaŭdo kaj dimanĉo.

Jen milito, jen la paco,
jen infano kun malsato,
la misiloj preskaŭ falas,
la kolomboj malkonsentas.
Estas tiel, estas tiel,

Tiel la mondo iras,
tiel la mondo iras,
tiel la mondo iras,
tiel la mond'.

Dekses horoj kiuj sonoras,
kaj ok horoj kiuj silentas
multaj homoj kiuj rapidas.
Jam alia tago venas.
Ni profitu la momenton
ĉar la vivo ne atendas,
estas tiel, estas tiel.

Tiel la mondo iras,
tiel la mondo iras,
tiel la mondo iras,
tiel la mond'

Iras por mi, iras por vi
iras por ŝi, iras por li,
Tiel la mondo iras,
tiel la mondo iras,
tiel la mondo iras,
tiel la mond'.

Verkisto kaj kantisto *Julían Hernández*

Kubo



LA KATO DE MATIGNON

Kiam la ĉefministro Alain Juppé alvenis en Matignon, li vizitis la tutan domegon kaj konstatis ke musoj svarme loĝas en la kelo. Li tuj venigis la pordiston kaj petis de li ke li malaperigu tiujn bestetojn. La pordisto diris : “ La nura rimedo estas havi katon”. Do diris Juppé : “Trovu katon k. metu ĝin en la kelon.”

Tuj dirite, tuj alportis dikan katon Kelkajn tagojn poste, malsupreniris al la muso. Tio kontentigis monaton



farite. Oni en Matignon. Juppé kelo : nenia lin. Unu

poste, kiam li faris la 3an viziton, ve; La musoj denove estis tie pli multnombraj ol dum la 1^a. vizito. Juppé tuj vokis la pordiston k. grumblis : Kion tio signifas? Kion do faras via fama kato?”

-Mia kato, S-ro Ĉefministro, mia kato? Ĝi fariĝis ŝtatoficisto”

El la franca tradukis F. Terral.

FRAZOJ- AFORISMOJ

1. Se vi ne kapablas, ne komencu!
2. Kiu pravas, ne timas.
3. Kiu saĝe silentas, li saĝe parolas.
4. Kiu longe intencas, nenion faras.
5. La libro estas kiel la akvo- trovas vojon ĉien.
6. La saĝulon oni konas en lia kolero.
7. Ne estas facili rigardi la veron en ĝiaj okuloj. Eblas, ke ĝi hontigos vin!
8. Se vi estas unufoje aĉetata, aliaj difinas vian prezon
9. Certigis por li amikojn kun "pasinteco" kaj li fariĝis homo kun "estonteco".
10. Li asertadis, ke ne povas marŝi reciproke kun la tempo, ĉar lia piedpaŝo estas granda.
11. Kelkfoje oni trovas inter la libropaĝoj la sekigitan verkiston.
12. Manekeno estas junulino, kiu promenas, por montri al la aliaj, kiel oni ne devas promeni!
13. Li ŝatis ĵeti polvon en la okulojn de la aliaj homoj. Iutage, tiu polvo malaltiĝis kaj surkovris lin!
14. Mi rigardis la veron en ĝiaj okuloj kaj ĝi okulsignis al mi.
15. La intrigojn oni flustras je orelo, por ne vekigi la saĝvoĉon.
16. De kie preni toleremon pri la fremdaj kvalitoj, se ĝi estas necesaj por viaj propraj malperfektecoj?
17. Juneco sen amo-printempo sen floro.
18. Kiam oni parolis al vi, ne distriĝu! Atentu, ke vi ne aŭdu tion, kion vi ne devas aŭdi!
19. Iras post vi, iras, kaj...subite ekpelas vin...
20. Ploru infano, por ke ne plori pli poste la patrino!

El bulgara tradukis: *Lilija Koleva*

TIDDALIK LA INUNDIGULO



Tiddalik (pr.tídalik) la plej granda rano iam konata, vekigis iun matenon kun neestingebla soifo. Li trinkis kaj trinkadis, ĝis neniuj freŝa akvo restis en la tuta mondo. Baldaŭ la kreiraĵoj ĉie estis mortantaj kaj la arboj defaligis la foliojn pro la manko de malsekaĵo. Ŝajnis, ke tre baldaŭ la rano, Tiddalik, estos la sola vivaĵo.

La bestoj tute ne povis elpensi kiel ĉesigi la teruran staton, ĝis saĝa, maljuna vombato sugestis, ke, se oni povos ridigi la ranon, Tiddalik, ĉiom de la entenata akvo elfluos el lia buŝo.

Do, ĉiuj kunvenis apud la ripozloĝejo de la grandega rano. Longtempe ili penis ridigi lin sed vane. La kukaburo, aŭstralia alciono, rakontis siajn plej amuzajn ŝercojn, tiel bonajn, ke li mem ne povis ne ridi; la kanguruo saltis super la emuon; kaj la plata lacerto anaspaŝis tien kaj reen sur du kruroj kaj elŝovis la stomakon; sed la vizaĝo de la rano Tiddalik, restis senesprima kaj indiferenta.

Tiam, kiam la bestoj malesperis, la angilo Nabunum, elpelite el sia preferata rivereto pro la sekeco, glitis al la nereagama rano kaj ekdancis. La movadoj unue estis malrapidaj, graciaj; sed dum la danco plirapidiĝis, li tordis sin kaj serpentis en la plej groteskajn kaj komikajn formojn, ĝis subite la okuloj de Tiddalik eklumiĝis kaj li eksplodis je rido. Dum li ridadis la akvo ŝprucis el lia buŝo kaj forfluis replenigante la lagojn, la marĉojn kaj la riverojn.

Tradukita de *June Peters*, Brisbano.

Kunlaborantino: *Jennifer R. Bishop*. (Australio)

Kuriozaĵoj

Kunlaboranto : Liven Dek

* Ĉe la Tre-baoj de Tibeto, ĉiuj filoj de la sama patro kundividas inter si unu solan edzinon. Tial do ĉiu familio celebras nur unu nupton en ĉiu generacio.

* Antaŭ la batalo, la romiaj centuriestroj faris al si la manikuron kaj eltiris la harojn de siaj kruroj.

* La napolaj virinoj kutimis meti sin nudaj sur la terasoj de siaj domoj kun la espero, ke la luno kreskigu ŝiajn mamojn.

* Kiam la romia imperio atingis sian plej altan gradon de potenco, en la 4a jarcento, ĝia voj-reto longis 80.000 kilometrojn.

* La manaj ungoj kreskas kvaroble pli rapide ol la piedaj. La unuaj kreskas ĉirkaŭ 0,06 centimetrojn semajne.

* La homa okulo kapablas distingi 10 milionojn da malsimilaj koloroj.

* Preskaŭ duono de la homaro havas la sango-grupon 0.

* La virinoj *karo-batak* de Sumatro, enigas en sian vaginon bulon el opio kiel kontraŭkoncipan rimedon.



Du kantistoj interparolas:

-Mi kantas tiel bone, ke kiam mi kantas, la Sankta Virgulino ploras.
-Tion mi ja scias, la pasinta tago mi iris en preĝejon kaj mi kantis al kristo, kaj post mia kantado Ŝi diris al mi, "vi kantas tre bone, ne kiel aliulo, kiu igas plori mian patrino"

Instruisto petas malgranda Andreo.

-Intersiĝu koneta por vi elementojn?
-L'fajro, L'akvo, L'brando
-Kion vi sufiĉe parolas?
-Kiel brando?
-Kiel patro revenas al domo drinkula, patrino parolas. "Denove estas en sia elemento.

kunlaboranto Kot Zdzistaw
(Polonio)

Pastro (skribante la daton sur bapto-registro).

-**"Mi pensas, estas la dek-oka, ĉu ne?"**
-**Indigna patrino. "Tute ne, sinjoro, nur la kvara".**

kunlaborantino Patricia Harkin
(Australio)

LOGIKO

La patrino enlitigas la etan
Peĉjo dormi
-Ne kuŝu ĉiam sur via maldekstra flanko, ĉar maldensigōs via hararo.
-Mi ne kredas- respondas Peĉjo.- Tio signifas, ke mia patro staras la tutan nokton sur sia kapo.

kunlaborantino Lilija Koleva
(Bulgario)

SAGAJ KAPOJ

-Kio estas pli necesa por la mondo: la luno aŭ la suno?
-Nature, la luno. Ja tage sen tio estas lume, kaj nokte sen luno estas mallume.

kunlaboranto Edilberto
(Kubo)

PETAĴO

Mi petas humorajojn el diversaj landoj por publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)
Sendu al:

CISIMO R. SIMON
c/ La magdalena n° 26 - 1° D
C.P.33400 - AVILES
ASTURIAS - ESPAÑA

VIRGULIN' DE KOVADONGA


(La Virgen de Covadonga)

Solemne


DANZA




Vir-gu-lin' de Ko-va-don-ga, Vir-gu-lin' de Ko-va-



don-ga, mal-gran-de-ta kaj a-gra-bla, mal-gran-de-ta kaj a-gra-bla,



— nek pen-trist' el la Ĉi-e-lo, nek pen-trist' el la Ĉi-e-lo, pen-tri



Vin es-tus ka-pa-bla, pen-tri Vin es-tus ka-pa-bla.—

ESPERANTA TEKSTO

Virgulin' de Kovadonga,
Virgulin' de Kovadonga,
malgrandeta kaj agrable,
malgrandeta kaj agrable,
nek pentrist' el la ĉielo,
nek pentrist' el la ĉielo,
pentri Vin estus kapabla,
pentri Vin estus kapabla.

Virgulin' de Kovadonga,
Virgulin' de Kovadonga,
malgrandeta Virgolino,
malgrandeta Virgolino,
estas nimfo de la nimfoj,
estas nimfo de la nimfoj,
kaj la flor' de la virinoj,
kaj la flor' de la virinoj.

Virgulin' de Kovadonga,
Virgulin' de Kovadonga,
portas en la manoj puraj,
portas en la manoj puraj,
floran afiŝon dirantan,
floran afiŝon dirantan:
"Balegaj inoj l'asturaj",
"balegaj inoj l'asturaj!"

